

Verschiĝint maandelijks  
Vijftiende jaargang  
N u m m e r 5 (167)  
M E I 1948

Vertegenwoordiger in Nederland :  
NEDERLANDA ESPERANTO-CENTRO  
Huygensstr. 17 B., Rotterdam-W.  
Postrekening 514366 van J.C.J. Ham.

Orgaan van de  
VLAAMSE ESPERANTISTEN-BOND  
POSTBUS 342, BRUSSEL  
Postrekening 2321.50 van V. E. B.

LIDGELDEN :  
\* Leden : 75 fr.  
\* Steunleden : min. 150 fr.  
Inwonende leden : 25 fr.  
(\* met bondsorgaan)

ABONNEMENTEN :  
België : 60 fr.  
Nederland : 4 fl.  
Ceteraj landoj : 75 bfr.  
Proefn. : 5 fr. (1 r.k.)

## Raporto 1947 de Fl. L. E.

Lastminute ni ekscias ke, en sia paska kunsido, la UEA-Komitato akceptis la aligon de Fl.L.E.

Nia kunlaboro estu fruktodona, tiel sur la internacia, kiel sur la flandra kampo!

### ENKONDUKO :

La jaron 1947 ni ankoraŭ konsideru kiel periodon de reorganizo, kaj nur kvalice de disvasigo. Ĝi ja estis la unua postmilita Ligo-jaro : nur je la fino 1946 ni ricevis el la senripozaj manoj de la Insututo, nian revuon. Kaj nova ligesturaro — kiu do anstataŭis la antaŭmilitan — ekektiĝis la 8.12.46.

Ni tuj provis envicigi ĉiujn aktivulojn de la antaŭmilita movado, kaj klopodis restarigi la servojn kaj kernojn kiuj formis la iamajn elementojn de komplika ligaparato. Tio postulis tempon, multajn vanajn penojn. Tamen aliĝis Esperanto-grupoj, sin anoncis reprezentantoj ; servoj denove giate ekfunkciis, F. E. ĉiam regulé aperis, la « Amikoj » de Fl.L.E. fortigis nin kaj Statuto kun Organiza Regularo adaptiĝis al la nunaj cirkonstancoj.

La Statuto-komisiono finis sian laboron meze de la jaro. Sekve de ĝia fruktodona laboro, la statuto kaj regularo estis aprobatataj dum generalaj Ligo-kunveno, respektive la 20.9.1947 kaj la 7.12.1947.

Ankaŭ en ĉi tiu jaro ni sentis nin sufiĉe tortaj por denove peti la aligon al U.E.A. kiel plenrajta landa asocio.

En la ceteraj punktoj de la raporto, ni laŭvice pritraktos la aktivecon de diversaj fakoj aŭ servoj de nia Ligo

### 1. LA SEKCIOJ :

La Esperanto-kernoj en Oostende, Gent & Bruselo, petis aliĝon. Entute ekzistas nun 7 oficiale aliĝintaj sekcioj : Antwerpen — Blankenberge — Brugge — Brusel — Gent — Mechelen & Oostende.

Ĉiuj vigle klopodadis kaj propagandis por Vintro-kurso. Vere interesa kurso

okazis en Blankenberge, kie kvindek 15-jaraj gejunuloj sekvis la lecionojn pri Esperanto en la ŝtata mezgrada lernejo.

Oostende propagandis multege, per ĉiuj eblaj propagandrimedoj : dank' al tio, kelkaj novuloj aliĝis. La promesita urba kurso en Mechelen komenciĝis sed la rezultaton ni nur ekscios en la jarraporto 1948. Sekcio Brugge ĉesigis, post kvinjara regula aperado la eldonadon de sia internacie konata revuo « Pa-co & Justeco ». Malgraŭ malpermeso de la okupantoj, ĝi aperigis interesan 7-paĝan buitenon dum tri militjaroj.

Generale, la loka aktiveco estis daŭre malhelpata de la maltrankvileco kaŭzita de internaciaj konfliktoj kaj atmosfero tute malfavora al porpaca aŭ internacia agado. Ni ne perdis la kuragon; cetero, dum 1947 ĉiuj sekcioj pligrandiĝis.

### 2. REPRESENTANTOJ :

Malgraŭ ripetitaj instigoj, nur malmultaj anoncis sin!

Cu nia devizo : « Ĉie en Flandrujo la Ligo havu reprezentanton » ne plenumiĝos ?

Kulpas nur, pro malaktiveco, kelkaj liganoj. La tasko tamen estas nek facilaj nek malindaj.

Kelkaj reprezentantoj aktive laboris por nia movado. En Hasselt, kurson organizis nia vigla ligano tie, kaj post translokigo, li ekpropagandis en la fabriko Overpelt.

En Oudergem, diversaj paroladoj estis donitaj kaj kurso organizita kun 16 lernantoj, ĉiuj inteiektuloj. Perposte nia reprezentanto tie dissendis 5.600 cirkulerojn, kaj tiamaniere semis jam por grandskala agado.

El tiuj du ekzemploj oni konkludas ke pionira agado estas ebla. Ni ne dubas ke baldaŭ en Overpelt kaj Oudergem fondiĝos vigla Esperanto-kerno.

### 3. FLANDRA ESPERANTISTO :

Nia revuo aperis sub redaktoreco de vicprezidanto Cortvriendt, kaj post la Kongreso, la Prezidanto transprenis tiun (daŭrigo : p. 2.)

## XIII-a KONGRESO DE FLANDRA LIGO ESPERANTISTA, BLANKENBERGE, Pentekoston 1948 (15-16-17 de majo).

### LASTA ALVOKO!

Nur kelkaj malmultaj tagoj pasos antaŭ la malfermo de nia XIII-a. Ankaŭ vi, karaj legantoj, faru vian eblon por ke ĝi sukcesu. Ni do instigas ĉiujn aliĝintojn al efektiva partopreno. Kongreso ja estas efika propagando por imponi eksterstarantojn, kiel ankaŭ plej taŭga rimedo por forĝi daŭrajn amikajn rilatojn inter la favorantoj de nia enlanda movado kaj stimuli ilian fervoron. De tempo al tempo tia stimulo dezirindas, necesas.

Samtempe ni petas, ke ĉiuj membroj kaj Amikoj de Flandra Ligo Esperantista, kiuj pro ia kaŭzo ne povos ĉeesti, pro solidareco subtenu niajn klopodojn laŭ sia eblo, ekzemple : havigante siajn kongreskotizojn (50 fr.) al la kongreskasisto, s-ro A. Pintelon, P.K. 47 26 76. Aliĝiloj estas ankoraŭ disponeblaj ĉe la sekretario : s-ro A. Marmenout, Malecotstr. 24. Blankenberge.

Restas al ni nur : danki pro via ŝatata helpo kaj deziri al vi plej agrablajn kongrestagojn.

### LA KONGRESKOMITATO.

Atentu : ĉiuj kongresdokumentoj estos disdonataj en la Akceptejo.

### PROGRAMO

#### Sabate

14.30 h. — Malfermo de la Akceptejo kaj de la Esperanto-Ekspozicio en la Mezgrada Lernejo (Onderwijsstr.)

15.00 h. — Deleĝitaro omaĝas florojn al la militmortintoj.

17.30 h. — Prelego de S-ano Mason Stuttard, helpredaktoro de ESPERANTO, en la sama ejo, pri : « La funkcio de Universala Esperanto-Asocio ».

19.30 h. — Provizora fermo de la Esperanto-ekspozicio. La akceptejo translokiĝas al la porinstruista Seminario.

20.00 h. — Oficiala malfermo de la Kongreso kaj interkonatiĝa festo kun balo en la porinstruista lernejo.

#### Dimanĉe

9.00 h. — a) Malfermo de la akceptejo kaj de la E. ekspozicio en la Mezgrada Lernejo.

b) Katolika Diservo kun E. prediko de P. M. C. Driessen en la Kapelo de la Instituto S-a Jozefo (Molenstr.)

c) Vizito de la Kongresurbo.

10.15 h. — La Urbestro oficiale akceptas la kongresanojn en la Mezgrada Lernejo.

10.45 h. — Generala Jarkunveno de Flandra Ligo Esperantista en la sama ejo. Tagordo : 1. Malfermo. 2. Salutoj. 3. Generala jarraporto. 4. Financa Raporto. 5. Transdono de la premioj por la Amiko-Varbado. 6. Rezolucio. 7. Fermo.

Definitiva fermo de la akceptejo kaj de la E. ekspozicio.

13.00 h. — Komuna fotografado.

13.30 h. — Komuna tagmanĝo en « Hotelo Orange & Flora » (Kerkstraat).

15.30 h. — Kunveno de la Estraro de Fl.L.E. en la Mezgrada Lernejo.

20.00 h. — Esperanta Festvespero kaj Esperantista Kabaredo prizorgita de la Fl.L.E.-sekcio Blankenberge « Norda Stelo ».

#### Lunde


9. h. — Aŭtobusa forveturo al Damme kaj Zoute.

13.00 h. — Komuna lunĉo.

16.00 h. — Oficiala fermo de la Kongreso.

### UNUA LISTO DE ENSKIBINTOJ.

1. — D-ro T. VAN GINDERTAELEN — Mechelen — 2. — E. CORTVRIENDT, Brussel — 3. — F-ino R. JURION, Brugge — 4. — F-ino J. TERRIJN, Gent — 5. — M. STUTTARD, Anglujo — 6. — S-ino M. STUTTARD, Anglujo — 7. — D-ro F. COUWENBERG, Blankenberge — 8. — S-ino COUWENBERG, Blankenberge — 9. — A. MARMENOUT, Blankenberge — 10. — S-ino R. PINTELON, Blankenberge — 11. — A. PINTELON, Blankenberge — 12. — J. VAN AS, Antwerpen — 14. — F. VOLDERS, Antwerpen — 15. — S-ino VOLDERS, Antwerpen — 16. — F-ino M. DOCKX, Burgt — 17. — A. DE KEYZER, Brussel — 18. — S-ino L. DE KEYZER, Brussel — 19. — E. COPPENS, Brussel — 20. — F-ino L. AARTSEN, Wilrijk — 21. — G. DE BOES, Antwerpen — 22. — F-ino M. J. TOP, Veurne — 23. — F-ino G. ROOSE, Blankenberge — 24. — R. TORREMANS, Antwerpen — 25. — F-ino H. HOFKENS, Antwerpen — 26. — F-ino M. HOFKENS, Antwerpen — 27. — F-ino AMELINCKX, Antwerpen — 28. — S-ino G. VAN GINDERTAELEN, Mechelen — 29. — F-ino C. BONTE, Blankenberge — 30. — F-ino J. AZAERT, Blankenberge — 31. — J. VAN TUYCKOM, Hemiksem — 32. — S-ino L. VAN TUYCKOM, Hemiksem — 33. — Pastro N. BECKERS, Overpelt-Fabriek — 34. — F-ino VAN DE WERF, Mechelen — 35. — P. VAN DER POEL, Mechelen — 36. — M. GOEDGEZELSCHAP, Mechelen — 37. — P. COUWENBERG, Blankenberge — 38. — J. COUWENBERG, Blankenberge — 39. — R. ISERENTANT, Brugge — 40. — S-ino B. ISERENTANT, Brugge — 41. — G. GOOSSENS, Lokeren — 42. — F-ino G. MALLET, Brugge — 43. — G. MAERTENS, Brugge — 44. — F. WILLEMS, Mechelen — 45. — S-ino H. ROOSE, Brugge — 46. — F. ROOSE, Brugge — 47. — F-ino P. DE COCK, Aalst — 48. — ROOZEN, Aalst — 49. — S-ino ROOZEN, Aalst — 50. — S-ino J. BUYL, Aalst — 51. — F-ino E. LEMAITRE, Aalst — 52. — A. VAN DE VELDE, Gent — 53. — S-ino M. VAN DE VELDE, Gent — 54. — F-ino J. MALLET, Brugge — 55. — P. H. MOOY, Brussel — 56. — S-ino E. C. ERNST, Brussel — 57. — F-ino N. VERDIN, Mechelen — 58. — E. PAESMANS, Antwerpen — 59. — R. VERMEISEL, Blankenberge — 60. — S-ino J. VERMEISEL, Blankenberge — 61. — F-ino D. VAN STEENE, Knokke — 62. — S-ino E. DESMEDT, Heist — 63. — G. DESMEDT, Heist — 64. — M. DESMEDT, Heist — 65. — 65 F-ino M. L. ROOSE, Brugge — 66. — F-ino M. TH. ROOSE, Brugge — 67. — F-ino A. VAN ELSLANDE, Oostende — 68. — S-ino I. DE BOES, Antwerpen — 69. — S-ino J. VAN HAREN, Antwerpen — 70. — S-ino A. CLAES, Antwerpen — 71. — F-ino D. LAPORTE, Blankenberge — 72. — J. BERNAERT, Blankenberge — 73. — R. DESCHEPPER, Gent — 74. — F. LUYTEN, Heist-op-den-Berg — 75. — S-ino L. LUYTEN, Heist-op-den-Berg — 76. — J. C. J. HAM, Rotterdam (Nederland) — 77. — H. VALCKENIER, Den Haag (Nederland) — 78. — Dro W. HOLZHAUS, Amsterdam (Nederland) — 79. — S-ino F. S. HOLZHAUS, Amsterdam (Nederland) — 80. — P. GENESIS, Eindhoven (Nederland).



Eldono LEEN, Amsterdam

# OBSERVOJ

SUBJEKTIVE.

«Kara Pik,» skribis al mi mia amiko Maliculo, «vi bone konas mian malsaton por la insidaj kaj subjektivaj metodoj kara al absolutismaj spiritoj. Tial mi ne povis rezisti la tenton rebati, same subjektive kiel ĝi estas formulita, publikan demandon de iu balkana Esperanto-revuo. Juĝu :



Cu vi estas por aŭ kontraŭ la liberiginto de la popoloj, por aŭ kontraŭ la unika lando de la socialismo, por aŭ kontraŭ la granda Sovet-Unio? — Mi estas kontraŭ la invadinto de Polujo, Estonujo, Latvujo, Litovujo, kontraŭ la atakinto de Finnlando, kontraŭ la unika lando kiu malliberigas ĉiujn siajn civitanojn — kaj, ho ve, ankaŭ ĉiujn siajn junajn civitaninojn — interne de propraj landlimoj, mi estas kontraŭ Sovet-Unio.

Mi esperas ke la soveta knabinoj kiuj estas malhelpataj sekvi la eksterlandan amaton, eterne dankos min por mia kuraĝa eldiro, ĉar mia galanteo multe superas la vian, ho kara. PIK »

## HET IDEE DER WERELDHULPTAAL IN DE POLITIEK.

Opvallend is dat aan het probleem der wereldhulptaal meer en meer aandacht wordt geschonken, ook door de politieke partijen. Zo de «Vooruitstrevende Partij voor Wereldregering», die, noewel van mening dat oprichting van een nieuwe partij versnippering van krachten zou kunnen betekenen, hiertoe toch besloot «gezien de volkomen negatieve reactie bij de besturen van de bestaande partijen om in hun programma de eerste doelstelling (Wereldregering) op te nemen».

## DE WERELDHULPTAAL OP HET PROGRAMMA.

Genoodzaakt door de drang der omstandigheden en gezien de steeds toenemende gevaren voor een derde Wereldcatastrofe is de «Vooruitstrevende Partij voor Wereldregering» in Nederland (secretariaat: Groot-Hertoginnelaan 36-a, Bussum) opgericht. Zij verwerpt elke vorm van dictatuur en haar voornaamste programmapunten zijn :

1. Het Nederlandse volk doordringen van de noodzakelijkheid dat de regering, eventueel in samenwerking met andere landen, onverwijld het initiatief neemt voor voorbereidende besprekingen tot de vorming van een Wereldregering met parlement, gesteund door een internationale politie.

2. Wapenfabricatie uitsluitend ten behoeve van de internationale politie, in opdracht en onder toezicht van de Wereldregering.

3. Internationale regeling van grondstoffen en voedselverdeling.

4. Internationale rechtsorde, waarbij onder anderen ieder land de plicht heeft een geschil op vredelievende wijze te beslechten en het recht om bij een dergelijk geschil een voor beide partijen bindende regeling te verkrijgen.

5. Bevordering van het internationaal verkeer tussen de volken, o.a. door wetelijke invoering op de scholen van het onderwijs in een Wereldhulptaal.

6. De drang naar levensruimte te doen verdwijnen door arbeidsmogelijkheid voor ieder mens in elk land.

7. Waarborgen voor vrije meningsuiting op ieder gebied.

## GEEN TALENPROBLEEM ?

Gelezen op blaz. 8 van het merkwaardige boek van Fr. S. Rombouts «Waarheen met ons vreemde-talenonderwijs?» :

«...ik veronderstel, dat de Tsjech even hartelijk lachen zal om mijn capriolen, als wij hier om zijn Nederlandse taalexplosies en -détaillementen. Hoe het er mee gaat, als men met een Litauer of een Let in connectie komt, laat zich raden. In zulke gevallen bewijst Esperanto wel eens onschatbare diensten, want alle kennis van Germaanse, Romaanse en Slavische talen laat je bij deze twee Baltische vormen in de steek...»

## VEELTALIGHEID GEEN OPLOSSING.

In hetzelfde boek vinden we op blz. 224 volgende merkwaardige bekentenis van een expert als Dr. E. Kruisinga :

Ieder weet bij ervaring, dat niet alleen geleerde, maar ook zeer geleerde en hooggeleerde Nederlanders met hun kennis van het Engels (dat een gemakkelijke taal heet) allesbehalve in staat zijn, zich op internationale congressen te helpen. En menig geleerde, die in Engeland een lezing moet houden, acht zich verplicht, niet alleen zijn rede door een vakman te laten vertalen, maar neemt私家atles om van het Engels spreken althans iets terecht te brengen. De meeste geleerden kunnen feitelijk slechts één vreemde taal min of meer vlot spreken, en is het met de taalleren anders? Hoeveel leraren Engels spreken vlot Frans, of om-

# LA STUDANTO

DE ZIN. (La Propozicio).

## INLEIDING.

Voorafgaande opmerking : Vandaag steken we van wal met «De studie van de zin», waaraan verschillende bijdragen zullen gewijd.

Sommige zinnen misschien grote ogen op, andere fronsen de wenkbrauwen of laten reeds op voorhand de moed in de schoenen zinken... Ja, wij weten het : dit grammaticaal punt heeft reeds velen schipbreuk doen lijden ! Daarom gaan we ook hier uit van het Nederlands, en zetten onze weg met kleine, doch vaste passen voort. Als jullie maar niet op voorhand een kurk op jullie verstand steekt, dan kan de leerstof er wel in !

Een zin is de uitdrukking van een gedachte door middel van woorden. Vb. : Ik leer Esperanto. — Het meisje gaf de vogels wat broodkruimels. — Kom je morgen? — Stil nu ! — Halt ! — 't Regent.

Als we een gedachte in een zin uitdrukken, dan willen we iets meedelen, iets vragen, of iets gebieden. Vandaar drieërlei zinnen :

- 1) De jongen schrijft. Deze zin deelt iets mede en wordt daarom een meedelende zin genoemd.
- 2) Schrijft de jongen? Deze zin vraagt naar iets, en is dus een vragende zin.
- 3) Jongen, schrijf ! Deze zin houdt een bevel in, en heet daarom een gebiedende zin.

Als we de zinnen 1) en 2) herlezen, bemerken we, dat, in het Nederlands, een vragende zin een andere woordschikking heeft dan een meedelende zin. — Inderdaad :

- a) De jongen schrijft.
- b) Schrijft de jongen?
- c) Het potlood lag op tafel.
- d) Lag het potlood op tafel?
- e) Zij zullen naar het strand gaan.
- f) Zullen zij naar het strand gaan?

In Esperanto luiden de vorige zinnen als volgt :

- a) La knabo skribas.
- b) Ĉu la knabo skribas?
- c) La kraĵono kuŝis sur la tablo.
- d) Ĉu la kraĵono kuŝis sur la tablo?
- e) Ili iros al la strando.
- f) Ĉu ili iros al la strando?

Hieruit leren we dat in Esperanto de vragende zin dezelfde woordschikking heeft als de meedelende zin. Deze laatste wordt alleen voorafgegaan door het woordje «ĉu», dat in deze rol, in deze functie, geen vertaling heeft : hier geeft het slechts te kennen dat de zin vragend is. Na een vragende zin plaatsen we steeds een vraagteken.

Bijgevolg : Om een vragende zin te vormen, plaatsen we de zin eerst in de meedelende vorm, zetten er het woordje «ĉu» vóór en sluiten met een vraagteken.

## Opmerkingen :

- 1) Slechts later komen de vragende zinnen, beginnende met een vragend woord aan de beurt. V.b. : Kie vi laboras?
- 2) Bij een dubbele vraag wordt het woordje «ĉu» niet herhaald, vooral niet als het onderwerp herzelfde is. Vb. : Ĉu vi iris al la gevoj kaj invitis ilin?
- 3) Een vraag wordt ook wel eens uitgedrukt door een meedelende zin, na dewelke men de woordjes «ĉu ne» plaatst. Vb. : Vi skribos, ĉu ne?

Bronnen : Tra la Labirinto de la Grammatiko (Faulhaber) ; Plena Grammatiko de E-o (Kalocsay — Waringhien).

## OEFENING 35 (20 punten)

1. Geef van de volgende meedelende zinnen, de vragende zinnen (slechts deze), in Esperanto : (5 punten)
  - a) Hij wist, dat moeder ziek was.
  - b) De Engelsen zijn flegmatiek.
  - c) Het lelietje-van-dalen bloeit in Mei.
  - d) De ouders zijn fier over het gedrag van hun enig kind.
  - e) Gij hangt het portret aan de muur.

gekeerd? Het zou voor ons vak goed zijn, als we meer de gelegenheid te baat namen om de ouders er op te wijzen, dat de eis van drie vreemde talen aan de meeste kinderen te zware eisen stelt en leidt tot camoufleren van de resultaten.

## MINISTER L. NEHER VOOR ESPERANTO.

Voro het Nederlandse nummer van het internationale Esperanto-tijdschrift voor P.T.T.-personeel schreef Minister L. Neher een inleiding, waarin hij o.a. op wees dat het uitwisselen van gedachten het best tot stand te brengen is door Esperanto. Voor Esperantisten bestaan immers geen taalgrenzen en de Minister eindigt met de wens, dat de uitgave aan het gestelde doel, vergroting van wederzijds begrip en wederkerige achting, zou beantwoorden.

2. In de volgende tekst zijn 20 fouten ingeslopen. Schrijf de correcte tekst — maak geen nieuwe fouten ! — en zet hem over in het Nederlands (10 p. + 5 p.)

Mi rememoras belan majotagon antaŭ tri jaro : arboj floras, mil floro ormanas la herbejoj, birdoj gaje kantas. La suno brilis de helblua ĉielo, ridante, varmigante la teron, kun ĉio kio ĝermas, odoras kaj revas.

Lenjo, mia fratino, festis sian edziĝon. Multaj gasto venis, karavano moviĝis al nia preĝejo. Lenjo estis dudekjaraĵ, en floranta beleco, en feliĉo ride-tanta.

Kelkan monaton poste, Lenjo vizitis nin. Li estis pala kaj ne plu feliĉo : ŝia edzo estis drinkulo.

Kaj denove la Majo, denove feliĉego en la naturo.

Ree moviĝis karavano al la preĝejo. Lenjo estis en ĉerko...

— Mi ne povas plue rakonti : vi ne plu vidas lajn vortojn, la literojn tra mia okulvitro...

(Laŭ A. Schneider kaj M. Carisson).

In te zenden vóór 20-5-48, aan het adres : V.E.B., Postbus, 342, Brussel. Wie de verbeterde taak terugwenst, weze zo vriendelijk een postzegel in te sluiten. — Het is toegelaten slechts één taak op te sturen.

## Verbetering oefening 34.

Vertaling in Esperanto :

- 1) Ĉi - vespere komenciĝos la Esperanto - kurso ; mi esperas ke multaj interesigantoj venos.
- 2) La hamstro havas vangosakojn, kiujn ĝi plenigas per greneroj, pizoj, faboj, por tiel porti ĉi tiujn fruktojn al sia kavo.
- 3) En la mezepoko, la servutulo ne rajtis migri al alia feŭdo sen la konsento de la feŭdestro aŭ de la vasalo.
- 4) Ŝi apogis sin al la malnova muro. Subite la fantomo staras antaŭ ŝi.
- 5) La lastaj violoj aromas ; baldaŭ la tulipoj ekfloros.
- 6) Jam tri jarojn ili ekspluatas grandan farmbienon en Ameriko.
- 7) Venu ĉi tien, Karlo ! Jen mono kaj letero. Vi aĉetos ĵurnalon por mi, vi enpostigos ĉi tiun leteron kaj poste vi povos ekludi.

T.

## De Redactie antwoordt.

Over oefening 33 (Maart-nr.)

Deze vertaling was misschien wat minder gemakkelijk dan de vorige. Fouten mogen jullie evenwel niet afschrikken : zij immers zijn toch de oorzaak dat «De Redactie antwoordt» ! En dit punt van deze rubriek is ongetwijfeld zeer nuttig. Het is nochtans niet mogelijk in alle bijzonderheden te treden, daarom is het geraadzaam nog eens de modelvertaling (zie April-nr.) na te zien.

- 1) Het stille landschap : het zwijgend landschap ; dus : *silenta pejzaĝo*.
- 2) *Allerlei* : ĉiaĵ ; «diversaj» en «ĉiuspecaj» zijn niet aan te raden.
- 3) *Aardige* ondervindingen : vreemde, dus : *strangaj* spertoj (niet : amuzaj, komikaj e.d.)
- 4) *Kudde* : *ŝafaro* of *grego* ; aro is niet voldoende.
- 5) *Voorlezen* betekent hier niet een lezing houden, als op een Kongres of aan een Hogeschool. Daarom is «prelegi» hier foutief. Het moet «*voĉlegi*» of «*laŭtlegi*».
- 6) *Ze luisteren allemaal graag naar hem* : Onnodig «*ili ĉiuj*» te vertalen. Goede zinnen : «*Ĉiuj satas aŭskulti lin*» — «*Ĉiuj volonte aŭskultas lin*».
- 7) *Ze horen niets dan 't knappen van 't vuur* : Ili neniam alian aŭdas ol la krakadon de la fajro. Na «*ol*» moet hier de *n* gebruik, daar de zin in werkelijkheid is : «*ili aŭdas la krakadon...*» De vorm «*ili aŭdas nenion krom la krakado(n)*» is ook juist. Toch gaat de voorkeur naar het eenvoudige : «*ili aŭdas nur la krakadon de la fajro*». Ook is «*krakado*» beter dan «*kraketado*», daar een houtvuur — we zijn immers bij herders — luid kan knappen.
- 8) *Aan de hemel* : *sur* la ĉielo, *sur* la firmamento (noch «*al*», noch «*en*»(!)). — Vergelijk met een vroegere oefening : «*la mantelo pendis sur hoko*».
- 9) Voor sterren is «*brileti*» beter dan «*brili*».
- 10) De maan *verlicht* : la luno *lumigas* ; «*heligas*» is hier een te sterke uitdrukking, en daarom af te keuren.
- 11) *Berytop* : *supro de monto* of *montosupro*. «*Pinto*», hoewel niet foutief, is minder geschikt, terwilj «*supraĵo*» (oppervlakte) beslist foutief is.
- 12) «*Klinken*» : daar het hier gaat om belgerinkel, dus het voortbrengen van een klank nog hoorbaar na het ophouden van de oorzaak, is «*sonori*» (niet : «*soni*») hier de geschikte term.

## RAPORTO 1947 DE FL.L.E.

(daŭrigo de p. 1.)

taskon, kaj grupigis stabon de lertaj kunlaborantoj. Ni ĉiam celis pligrandigon kaj plivalorigon, sed la nuntempaj grandaj kostoj de presado k.t.p. tute ne permesas tion ; nur, se nia membro-nombro konsiderinde kreskus...

Notu ke diversaj eksterlandanoj esprimis sian admiron pri la modela eldono ; jenon skribis leganto el *Budapest* :

«*Flandra Esperantisto estas majstre redaktata. Mi estas Esperantisto depost 22 jaroj, kaj Esperanto-verkisto, sed ankoraŭ neniam mi legis tiel bonan nacian Esperanto-gazeton*».

## 4. LA RADIO-SERVO :

1947 ne tiel favoris nin ĉe la radio kiel 1946. La 4-an de aprilo elsendiĝis la dua parto de la Radio-kurso. Kontentiga estis la rezultato sed bedaŭrinde, la Prizorganto, Drs *Symoens*, por kelka tempo forlasis nin.

## 5. LA GAZETARSERVO :

Fondita dum la lasta parto de 1947, ĝi tuj ekfloris. Regule aperis ± 30 artikoloj, novaĵoj aŭ kronikoj en nederlandlingvaj tagjurnaloj. Ĝia tereno ankoraŭ plivastigos.

## 6. EKSPOZICIA - SERVO :

Ĉi tiu servo, kunlaborante kun Flandra Esperanto-Instituto, dum la tuta jaro strebis la fortojn por diskonigi nian movadon, kaj legi la gesamdeanaron. Helpante la lokajn sekciojn en *Oostende* kaj *Gent*, ĝi starigis tre etikajn stendojn en la komercaĵ foiroj, kies propagandan valoron ni ne taksu tro malalta.

En Mechelen, la servo belegan ekspozicion aranĝis, kaj ĉiuj vizitintoj plendis ke ili ne disponis sufiĉan tempon por admiri aŭ aĉeti la belajn literaturaĵojn kaj broŝurojn.

Cetere, ĉiu ligo-kunveno en *Brusele* havis, pro la libro-ekspozicio, apartan loĝadon.

## 7. AMIKOJ :

En Marto aperis la unua alvoko por varbi Amikojn de *FL.L.E.* Tiu agado daŭros ĝis la 30.4.48 ; fine de la jaro jam 350 estis varbitaj.

La celo ne nur estas financa, sed ĉefe propaganda. La Amikoj iĝu aro de simpatiantoj, el kiuj ni ĉerpos membrojn kaj kunlaborantojn en ĝeneralaj efektividuoj, kiel la petskribo, la radio-kurso, k.t.p.

## 9. SEKRETARIEJO :

Ĝi forsendis i.a. la unuan cirkuleron kun komunikoj, kaj starigis ampleksan dokumentaron, kaj aperigis estrarajn sciigojn pere de «*Babilado*» en *F.E.* Ĝi klopodis «*ligi*» la estraron kun sekcioj kaj reprezentantoj.

## 10. KUNVENOJ :

Okazis 3 ĝeneralaj ligokunvenoj en Mechelen, Brussel kaj Gent.

Por la pritrakto de urgaj aferoj, la estraro kunvenis 4 fojojn en la samaj urboj. La Statuto-Komisiono okazigis du kunsidojn.

## KONKLUDO :

Rimarkindaj faktoj :  
Re-eldonado de *F.E.*  
Aliĝo de 3 sekcioj.  
12-a Kongreso en Mechelen.  
Radio-kurso.  
Starigo de 3 servoj.  
Amikoj de *FL.L.E.*

Ĉiuj tiuj faktoj estas produktoj de organiza laboro. Dum la 2-a parto de la jaro, nia Liga vivo iĝis pli intensa ol en la jarkomenco. La jaro 1948 do montriĝas kaj komenciĝis esperplena.

La ĝenerala sekretario,  
*Maertens G.*

13) *De dag van morgen* : la morgaŭo, of la morgaŭa tago (niet : la tago de morgaŭ !)

Aan *V.E.B., Gent* : 1) *avondlied* : *vesperkanto*, — *himno* ; *versperkanzono* is hier niet geschikt. 2) «*knarado*» is te scherp voor «*knappen van vuur*». 3) La luno *lumigas* la suprojn de la montoj kaj de la herbejoj(!) : vergelijk even met de Nederlandse tekst. 4) *Schaapskooien* : *ŝafstaloj* of *ŝafoj*, stellig in 't *meervoud*. Zie ook nog hierboven. — Toegekende punten : 7.

Aan *S.P., Blankenberge* : zeer goede vertaling. — Voor een drietal onjuistheden : zie de algemene opmerkingen. — Toegekende punten : 9.

Aan *G.D., Heist aan Zee* : zo U de kopij bewaarde van de ingezonden tekst, zal U gemakkelijk begrijpen, dat het ons onmogelijk is hier uw ingezonden taak volledig te bespreken. Daarom : vergelijk uw werk met de model-vertaling in het April-nr., bestudeer het antwoord van de Redactie in dit nr., en... pak de nieuwe taak met nieuwe moed aan : «*Men prijst een stuur begin*». — Toegekende punten : 5.

De overige «*studantoj*» kregen hun taak met persoonlijke nota's terug.

Aan «*Onidrinkas*», *Blankenberge* : daar het hier nog over oefening 32 gaat, wordt verwezen naar de vorige nrs. Waarom te laat ? Nu ja, kiam «*Onidrinkas*»...

## La Plej Belaj Ĝemeloj en Hispanujo

verkis : K. Van Baelen  
el la flandra : Hedero, kiu dediĉas  
sian tradukon al nederlanda virino, Klara.

Kiam *Maria di Ferrari* naskis ĝemelojn, pli grandis ŝia fiero ol ŝia sufero. Ĉar belformaj knaboj jen kuŝis en la lulilo, la unua dekstre, la alia maldekstre. Kaj la najbarinoj trovis ke ĉi tiu havas la patrinan nazeton, sed tiu la patran frunton; ili kumbatis la manojn: ankoraŭ neniam ili vidis tiajn ĉarmajn infanojn! Kvankam, vere, ili estis malbelaj kiel ĉiuj ĵusnaskitoj kaj neniel distingeblaj. Escepte tamen ke ĉi tiu kuŝis dekstre en la lulilo kaj tiu maldekstre.

Ce ilia bapto estis grandioza festo kaj ĉiuj familianoj ĉetablighis, ĉar la *Ferrarioj* formis genton eminentan kaj nomburan, fieran pri siaj nomo kaj posteuloj. Kaj la unuan ili baptis *Fernando*, laŭ lia patra avo, kaj la alian *Vicente*, laŭ lia patrino avo.

Kaj tiel ili senzorge pasigis siajn unuajn monatojn en la lulilo kaj la sama nutristino suĉigis ilin, sed ĉe ŝia brusto la unua kuŝis maldekstre kaj la alia dekstre.

La du fraĝuloj kreskis kaj ĝis bubetoj. Ili kune petolis en la parko antaŭ la bieno kaj en la malantaŭa ĝardeno; ili ludis ĉevalon kaj trajnon kaj militon, kaj ĉiujn ravaĵojn ludojn, en kiuj ili estis grandaj personoj, en kiuj ne intervenis bagateloj sed la fantazio havis plene liberan kuron. Estis tiel agrable kune lukti, ruliĝi en la sablo kaj, eĉ ne unu momenton, foresti unu de la alia. Vespere, ilia vizaĝo estis plezure varma pro la ludo kaj ilia vesto plezure malpura. Tiam ili baniĝis antaŭ la ĉetabligho. Sed kiom bela kaj brava poste ilia etula apero!

Ĉu mi jam diris ke ili similas unu la alian kiel du akveroj? Tio okazas al ĝemeloj, precipe kiam ili ankoraŭ malgrandas. Nur la gepatroj rekonis ilin. La aliaj ĉiam petis antaŭe maneton: kaj kiu etendis la maldekstran maneton estis *Fernando*, sed *Vicente* donis la belan maneton.

Iam tio estigis tumulton ĉe la tablo. Ĉar *Fernando* ne deĉe manĝas, fi, per la maldekstra mano! Sed li juĝis ke ne kulpas li, li estas ja maldekstra, kaj li restis maldekstra, obstine kaj decide, tial ke li havis la temperanton de la *Ferrarioj*.

Post la manĝo, ili ĝentile deziris bonan nokton, recitis — ĝenuine antaŭ siaj litetoj — sian vesperpreĝon, kun rigide fermitaj okuloj kaj plektitaj manetoj, kaj kviete dormis ĝis la posta mateno, kiam denove ekis agrable longa tago. Kiuj estis iliaj infansongoj, ni ne scias, sed koncerne la ceteron iliaj agoj kaj faroj estis identaj, escepte ke *Vicente* estis dekstra kaj *Fernando* maldekstra.

Kaj ili lernis legi kaj skribi kaj kalkuli, ĉar ili jam ĝis knaboj. Kaj la gubernisto deklaris sin tre kontenta: ilia spirito montrigis ja vigla kaj komprenema. Ili ankaŭ manifestis grandan diligenton kaj sciemon. « Sed strange, *Senora la Condesa, Fernando* nepre volas lerni maldekstre skribi. — « Nu, tiam di-

ris, *Maria di Ferrari*, mi kredas ke vi plej bone lasu lin libera, li ja persistos. Kaj cetero, la maldekstra mano valoras la dekstran, ĉu ne? Ĝi same proksimas al la koro, eĉ pli. » Tiel ili lernis legi kaj skribi kaj kalkuli, kaj ambaŭ laboris rapide kaj inteligente, sed *Fernando* skribis maldekstre kaj *Vicente* dekstre.

Memkompreneble, tia instruo ne sufiĉis por *Ferrarioj*. Ili do vizitis la lernejon por akiri sciencojn kaj saĝon. Ankaŭ saĝon, ĉar la kolegio, kie ili studis, klopodis havigi al ili formadon, taŭgan karakterformadon, kiu, eĉ pli ol kono kaj inteligenteco, estas la sloŝilo de bela kaj fekunda vivo. Kaj la du fratoj farigis seriozaj knaboj, kun ioma lanugo sur la supra lipo kaj fortaj, propraj ideoj. Ilia bruemo forlasis ilin. Ili farigis trankvilaj kaj kune rezonis pri multaj problemoj, sed kun aliaj ili malmulte parolis. En kompanio de plenkreskuloj, ili ne bone sciis kion fari per la manoj kaj, prezentate al plaĉa junulineto, ili facile kontuzigis.

Ne imagu, ke ili estis silentaj kaj singenaj. Dio, ne! Ili ŝatis ludon kaj sporton, kaj iam atakis ilin sovaĝo kaj perforto, erupcioj de iliaj riĉa temperamento kaj varma hispana sango. Sed dum la libertempo ili ne plu petolis, kiel antaŭe, en parko kaj arbaro. Ili prefere legis kaj promenadis; ili naĝis kaj lernis ĉevalrajdi. Ankaŭ direkti la aŭton ili lernis, sed tio estis sekreteto inter ili kaj la ŝoforo, ĉar *Paŭlo* juĝis ilin ankoraŭ tro junaj por tio. Ili plej ŝatis ekzerci sin per la pistolo, por ke ilia mano firmigu en la ĉasado. En tio ili ege konkuris, ĉar ambaŭ estis bonaj pafistoj: same rapida kaptado, same firma celado, same precizaj pafoj. Sed *Vicente* pafis dekstre kaj *Fernando* maldekstre.

Tiam levigis la demando pri elekto de profesio. Kaj neniu miris kiam *Fernando* malkaŝis sian intencion eniri la armeon. Ankaŭ *Vicente*, kiu kuragiis entrepreni la inĝenierajn studojn, akiris ĉies aprobon. Ĉar la *Ferrarioj* konsideris armeon kaj sciencojn same belaj alvokigoj, indaj de *Ferrarioj*. Tiel do disigis iliaj vojoj kiel, ho ve, okazas al ĉiuj fratoj: *Fernando* frekventis la militistan lernejon, *Vicente* la universitaton. Kiom belaj tiuj jaroj! Ambaŭ seriozaj kaj idealistoj, plenaj de la unua vireco, la fajra potenco senlima, garantito por la viveblo de iliaj plej aŭdacaj revoj! Iliaj revoj! Ho, kiel alia kaj pli bona baldaŭ estos la mondo, kiam ili foje staros en la reala vivo, la bela, potenca, ŝaŭma vivo! Ho, iliaj revoj! Ili parolis pri ili kaj fajrigis, kiam ili hejme libertempis. Politiko, sociologio, ekonomio, kio do ne! Ankaŭ arto kaj scienco; kaj filozofio, la privilegio de kelkaj! Pri ĉio ĉi ili parolis, sed estis videble ke *Fernando* inklinis iom pli maldekstren ol lia frato, kiu estis radikale dekstra.

La jaroj pasis kaj ili farigis viroj, kun jam la vera seriozo kaj ankoraŭ bela tuteco de sia aĝo. *Fernando* estis aktiva

soldato kaj rapide promociigis, ĉar li promesis riĉigi energia oficiro. *Vicente* akiris sian doktoran diplomon kun granda frukto, ĉar li estis dotita kaj laborema: multpromesa elemento. Fininte sian servodevon kiel rezerva oficiro, li ekloĝis en la bieno de la *Ferrarioj* kaj dediĉis sin al la scienco. Nur de temp' al tempo *Fernando* venis ferii kaj tiam li pasigis tutajn tagojn fiŝante, kiam *Vicente*, pasia amato de aviado, dum la liberaj horoj, rondveturis en sia sportflugmaŝino. Ili ankoraŭ parolis unu al la alia, sed malpli ofte. Ankaŭ la tono de iliaj konversacioj ĝis pli ĝenerala, ĉar iliaj opinioj pli kaj pli disigis. *Fernando*, kiu vivis en la grandurbo kun postulema tasko kaj la subpremita nostalgia al siaj revoj, por kiuj ne restis loko en la militista vivo, inklinis pli kaj pli maldekstren. Sed *Vicente*, kiu trovis sian kontenton studente en la kvietaj bieno, estis pli dekstra ol iam. Kaj tiam... Se nur eblus mensogi kaj diri: tiam, ili longe vivis kaj feliĉaj! Sed la okazajoj ne estas kiaj ni rakontas ilin, ni devas rakonti ilin kiaj ili estas...

Tiam elrompigis la milito. Elrompigis, ni diras, kiel pri sovaĝa besto, sed eĉ ne sufiĉe drastas la esprimo. Unue venis periodo de politika streĉo, kaj jen, la potenco de la politiko: tiuj ĝemeloj, kiuj kune vivis en la patrino sino, kiuj suĉis la lakton de unu brusto, nun ekdisputis kaj kolerigis, ĉar la alia ne vidis kie kuŝas la savo de *Hispanujo*.

Kaj sekvis la interna milito. Kio fakte ĝi estis? Kelkaj ribelantoj? Ĉiukaze io sufiĉe serioza por lasi la decidon al la armiloj. Kaj ambaŭ fratoj opiniis ke la momento de l' ago venis kaj senhezite prezentis sin, ĉar ili pretis oferi la sangojn por sia partio. Sed *Vicente* batalis dekstre kaj *Fernando* batalis maldekstre.

Kion diri pri la milito? Ne multe. Reciproka elmurdo; jen la duvorta resumo. *Fernando* estis energia oficiro, al kiu oni konfidis la plej dangeŝajn poziciojn; *Vicente*, brava aviadisto, leŭtenanto en la aer-artilerio. Plej turmentis ĉi tiun la nescio pri lia familio, ĉar la bieno de la *Ferrarioj* situis en la malami-ka teritorio. Ambaŭ distingigis kaj perdis brakon: *Fernando*, la dekstran, *Vicente*, la maldekstran. Sed ili rezignacie akceptis sian sorton, kvankam ili vidis multajn iluziojn kaj idealojn sveni en fumon.

Tiam venis la fino: *Vicente* montrigis heroo kaj *Fernando*, perfidanto, kvankam ambaŭ batalis same kurage. Sed la heroo akiris amnestion por la perfidanto, ĉar estis ili ĝemeloj kaj la *Ferrarioj* influaj. Kaj tiel ili ree kuniĝis kaj ili loĝis en la domo, kiun ili konstruigis apud la ruinoj de la malnova kastelo, sed la patrino mortis kaj la patro farigis maljunulo. La fratoj malote interparolis, mi kredas ke ili ekmalamis unu la alian. Ĉar ĉiu loĝis en alia alo de la kontraŭajo: *Vicente* havis siajn ĉambrojn dekstre, *Fernando* maldekstre. Nur

ĉetabile ili vidis unu la alian. Tie ili sidis unu fronte al la alia, kaj ili ŝajnis spegulo-bildo, ĉar tiel ili ankoraŭ similis unu la alian. Kaj *Vicente* manĝis dekstre, sed *Fernando* maldekstre, ĉar ilia alia brako estis malplena maniko.

Kaj la tono de iliaj konversacioj ne estis kora. Ofte ili eĉ disputis, vere akre disputis, ĉar antaŭ ili ankoraŭ sidis: la malamiko. Tiam ili malgraŭe pripensis ke ili estas ja fratoj, kaj intencis silenti pri milito kaj politiko, sed iliaj intencoj baldaŭ cedis.

Kaj unu vesperon, kiam *Vicente* pruvis, kiom falsaj kaj nefidindaj estis la *Ruĝaj*, li citis la ekzemplon de la civila hospitalo de *San Camilo* en S., kiun ili plenstopis per municio kaj armea materialo.

— *San Camilo*, vi diras? *Fernando* iom paliĝis. Kiel vi sciis tion?

— Kiel ni sciis tion! Estis publika sekreto ĉe la stabo, ulo. Kaj ni agis laŭ ĝi.

— Nu, kio do okazis?

— Tion mi rakontu al vi. Tiu trompan kaŝejon, tiun malkuraĝan ruzajon, misuzantan la plej noblajn sentojn, mi havis la honoron persone bombardi en ruinojn.

*Fernando* rektigis, li nun aspektas iom pala.

— Tiel! li diris per stranga tono. Tiam ankaŭ mi ion rakontu al vi. Tiu trompa kaŝejo, tiu malkuraĝa ruzajo, misuzanta la plej noblajn sentojn, estis vera hospitalo kun malsanuloj, ĉu vi komprenas? Mi eĉ tre bone konis unu el ili. Ankaŭ vi konis ŝin. Estis maljuna virino, kiu iam naskis ĝemelojn, la plej belajn ĝemelojn en *Hispanujo*!... Nun ankaŭ *Vicente* rektigis kaj konsternigis rigardas... Tiu virino, *Vicente* estis la mortinta *Maria di Ferrari*... Vi, patrinmurdanto, vi!...

Kaj la du ĝemeloj, la fiero de la *Ferrarioj*, kiuj kune dormis en unu lulilo, kune ludis trajnon kaj militon, kiuj kune recitis sian vesperpreĝon kun plaj manetoj kaj rigide streĉaj okuletoj, tiuj du ĝemelaj fratoj, kiuj similis unu la alian kiel du akveroj, kune vizitis la lernejon kaj revis mirindajn aferojn por sia lando, jen tiras sian revolveron, kaj...

...Ne, ili ne mortas. Eble miraklo, sed ili ne mortas. Vi ja scias ke *Vicente* estis dekstra kaj *Fernando* maldekstra, ke ili estis same rapidaj pri la pistolo... Tiel la pafoj ŝajnis unu kaj ambaŭ restis senvundaj. Ĉar la kugloj, destinitaj por la du ĝemelokoroj, renkontigis precize en la mezo kaj estis senforma maseto, kiu saltete falis sur la tablon.

Tiam ili sciis ke okazis miraklo, kaj ke ĝemelaj fratoj ne ekzistas por murdi unu la alian, eĉ se unu estas dekstra kaj la alia maldekstra. Kaj ili juris per la *Dipatrino* kaj la murdata koro de la mortinta *Maria di Ferrari*, ili juris super la metala maseto, ke neniam plu ili atencos unu la alian, sed estos veraj fratoj, infanoj de unu patrino.

El « Een Mensch op den Weg ».

Kun la afabla permeso de la Eldonejo:  
De Kinkhoren, Brussel.

### De Pers en Esperanto.

In een uitgebreid artikel bespreekt de « Zondagochtend » (Antwerpen) enkele aspecten van de wereldtaal onder de titel « Esperanto of wat anders ».

De zo juist gelanceerde Engelse Esperanto-film, met medewerking van de B. B.C. speaker Frank Philips wordt besproken in « Het Laatste Nieuws » (Brussel), « Het Nieuws van den Dag » (Brussel) en « De Gentenaar », die eveneens de Esperanto Gramofoonplaat *Eterna malgajeco* (gezonden door Mev. Gautreuil) vermeldt, alsook het 15-e Nederlandse L.E.E.N.-Kongres te Almelo. Dit laatste werd ook door « Het Nieuws van den Dag » (Brussel) opgenomen, dat ook een bericht publiceert nopens het verzoek van de Heer Dworschak, Directeur-Generaal bij het Beheer der Oostenrijkse Post, gericht aan alle Postadministraties, en dat Esperanto aanbeveelt. Dit bericht wordt ook door « De Zondagochtend » overgenomen. « De Standaard » (Brussel) en « De Nieuwe Gazet » (Antwerpen) publiceren de mededeling over de Esperanto-Gramofoonplaat. « De Beiaard » (Brugge), nam welkijks een artikel op, terwyl de « Nieuwe Gids » en het « Vrije Volksblad » een bijeenkomst van Esperantisten te Brussel aankondigen. Dit publiceren ook in de Franstalige pers « La Lanterne » en « Le Soir ».

In 't totaal kregen wij kennis van 18 berichten of artikels in de Nederlandstalige pers, en 11 in de Franstalige.

Jus aperis :  
Cefverko de la finna literaturo

### SEP FRATOJ

RAKONTO DE ALEKSIS KIVI  
El la finna originalo tradukis Ilmari Ekström, Vilho Setälä, kaj aliaj — Vinjetoj de artisto Ahto Numminen — Kun biografio de la verkinto kaj klarigoj.

360 paĝoj, bindita : bfr. 125

Flandra Esperanto-Instituto  
P. van Humbeekstr. 3, Brussel-W.  
(p. k. 3268.51)



### Per speciala aviadilo al Malmö!

Se en Belgujo sin anoncas 27 interesatoj por aviadila vojaĝo al la Universala Kongreso, la prezo ĝis 1.800 bfr. (triaklasa fervojbileto kosta 1524 bfr.) por la aerveturo Brusel-Malmö-Brusel en speciala aviadilo. Partoprenantoj povas ekveturi laŭ elekto de la flughavenoj en Brusel aŭ Ganto. Ili rajtas kunpreni 50 kgr. da pakajo.

La vojaĝbileto enkluzivas asekuron de 5.000 pundoj sterlingaj. Vojaĝdaŭro: 5 horoj (vagonare: 30 horoj) en plej komfortaj kondiĉoj. Tempoŝparo de du tagnoktoj da laciga vojaĝo kaj minimumaj formalajtoj: nura pasporto sufiĉas.

La forveturo okazos sabaton la 31-an de julio, la reveturo sabaton la 7-an de aŭgusto. Interesatoj sin anoncu plej baldaŭ al nia samideano A. v. d. Velde, *Buffelstr. 3, Gent*. Necesas antaŭpagon de 600 bfr. po partoprenanto, pagebla pere de la p.k. de Sano v. d. Velde, n° 4769.82. Pagitajn sumojn oni ricevos se laŭ kaŭzoj malhelpus la vojaĝon. Interesatoj petu kompletigajn informojn!

### 100 svedaj kronoj!

La 33-a Universala Kongreso de E. en Malmö decidis doni entute som de 100 sv. kronoj kiel premio(j) al tiu(j) persono(j), kiu(j) ekster Svedujo aperigos la plej grandan kaj bonan artikolon pri E. kaj la 33-a U.K. en naciaj gazetoj kaj ĵurnaloj. La artikoloj estu rigardotaj nur el reklamvidpunkto. Kondiĉo estas, ke oni menciu la kongreson en Malmö. La gazetoj kun la E-artikoloj devas atingi la E-Kongreson, Malmö, antaŭ 20.7.48 kun surskribita nomo kaj adreso de la artikolaperiganto kaj informo pri la eldonombro de la gazetoj. Ado la artikoloj pli grandigos la ŝancojn.



E. GLUMARKOJ : haveblaj ĉe *Dro Tadros Megalli*, ĉefdel. UEA, P. B. 1914, Kairo, Egiptujo.

Du diversaj glumarkoj estis eldonitaj : unu prezentas piramidon kaj sfinkson kaj la E. stelon kun teksto en E. kaj en la araba : *Lernu Esperanton* ; la alia, *Dron Zamenhof*, kun araba teksto : *Lernu E.on, la internacian lingvon de Dro Z., aŭtoro de E.*

Dukoloraj, verdaj sur blanka fono, tiuj markoj estas nepre plaĉaj kaj uzindaj. Ili estas mendeblaj ĉe la dirita persono kaj 100 ekz. kosta 3 int. resp. kuponojn.

VIVO KAJ ARTO DE GOJA, de *Agostino da Silva*, el la portugala de *Vergílio Mendes*, eld. *Portugala Eldona Rondo*, 20 p. Mendebla ĉe la landa peranto : G. Basteels, Montenegrostraat, 190, Vorst-Brusel ; prezo : unu kajero, 7 Fr., ses kajeroj, 34 Fr.

Jen nova verketo en la serio « Enkonduko en la kulturon », en kiu la aŭtoro skizas la aventuran vivon de la konata artpentristo (1746-1828). Kiel kutime la verketo estas leginda, ie kaj tie ilustrita ; la lingvo estas bona, ĉetere kontrolita de la Literatura Komitato de A.L.E.

ESPERANTA BATALKANTO. — Teksto de T. Jung ; muziko de J.M.J. Driesen. Eldono : « Heroldo de Esperanto ». Prezo ĉe F.E.I. : 10 B.Fr.

Jam dekomence oratoraj samideanoj kaj profetaj poetoj admonis ŝafistojn kaj ŝafaron ne pretervidi la gravan celon, aŭ instigis la « pacajn batalantojn » al la

finbatalo, ĉiufoje kiam ideologiaj, lingvaj aŭ individuaj kontraŭejoj endanĝerigis la ununuran verdan fronton. Tiel ankaŭ la strategia generalo *Teo Jung*, kiu krome posedas la talenton mildigi la batalordonojn per sobra poezio.

J.M.J. Driesen do prave metis super la Jungaĵon « *Jam estas temp'!* » el « *Ek al Batal'!* » (1935) la freŝe sonorajn notojn, kiuj fajrigos la grupanojn dum la kantvesperoj. Ili ne hezitu mendi la taŭge eldonitan tekston kun muziknotoj, kiu povas esti ludata kaj kantata sen speciala rajtigo kaj... granda peno.

TYN.

SEP FRATOJ, rakonto de A. Kivi, el la finna tradukis *Ilmari Ekström*, eldonis *Vilho Setälä*, 360 p. ; havebla ĉe F.E.I. 125 Fr. Recenzo baldaŭ aperos.

PRINTEMPO DE MORTO, romano de *Lajos Zilahy*, el la hungara *Ladislao Somlai (Spiere)*, eldonis *Eldona Societo Esperanto*, Stockholm, 1947, 119 p. ; havebla ĉe F.E.I. Recenzo baldaŭ aperos.

BREVE HISTORIA DEL ESPERANTO, de *Daniel Quarello*, eldonis *Quarello & Cia*, Buenos Aires, 1946, 30 p.

### GRAVA AVIZO

Flandra Esperanto-Instituto estos fermita de la 12-a de majo ĝis la 27-a de la sama monato. Mendojn kaj korespondaĵojn sendu antaŭ aŭ post tiuj datoj!

## Plaatselijk Nieuws

**V.E.B. Afdeling Antwerpen:** Het programma April werd normaal afgewikkeld: op 19.4 hield de Voorzitter, dhr J. Jacobs, een interessante spreekbeurt over «Danujo». Talrijke leden namen deel in het Feestje, ingericht door Afdeling Brussel.

Voor Mei werd de rooster vastgesteld als volgt: 3.5.48, Kantvespero (studo de kongreskantoj); 10.5.48, Parolado de F-ino Hofkens H.; 24.5.48, Variajo, voçlego de Dro Van Gindertaelen; 31.5.48, Surpriza vespero.

**V.E.B. Afdeling Brugge:** Op 1 April werd de maandelijks voordracht gegeven door Drs Roose, die «De Feodaliteit» behandelde. Een zangavond ging door op 8.4.48: onder leiding van Mej. M.L. Roose, werden verschillende Esperanto-liederen herhaald of aangeleerd. De Brugse Esperanto-volksdansgroep oefent regelmatig, waardoor het repertorium steeds uitgebreider wordt.

**V.E.B. Afdeling Mechelen:** Het examen van de stedelijk avond-cursus liep best af: enige leerlingen wonen thans de vergaderingen bij. Er werd een begin gemaakt met een volmakingscursus, waarvoor La Verdu Koro wordt gebruikt. De leden der afdeling zullen talrijk de reis naar Blankenberge ondernemen; zij zijn ook in getalle opgekomen in Brussel, op het Feestje door de plaatselijke afdeling ingericht.

**V. E. B. Afdeling Oostende:** Het Maart-nummer van La verdu Lumo brengt verslag uit over ons vijfde Esperanto-feest, dat door talrijke Esperantisten van buiten Oostende werd bijgewoond; het was een uitstekende propaganda voor de buitenstaanders en was ook een financiële steun voor de deelname in de Jaarbeurs. Het Stadsbestuur zegde kosteloos een stand toe, waarop met een gans nieuwe installatie en voorstelling uitgepakt wordt: zij begint op 8.5.48.

### ANTWERPEN

Op 22 Mei e.k. zal de Heer L. O. Van Hoor, ter gelegenheid van het week-end in de Jeugdherberg te Antwerpen, een voordracht houden over «Esperanto en de Trekkersbeweging». Deze spreekbeurt gaat door op initiatief van de leiders van de Vlaamse Jeugdherberg-centrale.

### OUDEGEM

La 7.3.48 okazis sukcesa intima festo en la nova E-ista Hejmo Belgica: post promenado, ĝi komenciĝis je 17.30 h. kaj daŭris ĝis 20.30.

Post optimisma enkonduka paroladeto de la organizinto, S-ano Loeckx, la kantono EKI-Bruselo aŭdigis kelkajn kantojn (gvidado: S-ano Cullus) kaj la teatra sekcio prezentis amuzan teatraĵon.

## Niaj Esperanto-Enigmoj kun premioj

PREMION gajnis post n-ro 37-38: s-ro Marmenout, el Blankenberge.

### SOLVOJ.

N-ro 39. HORIZONTALA. 1. mod; dron; sav. — 3. novajo; cindr. — 5. kontraŭstari. — maldungi; ebl-obl. — 9. pir; doganist. — 11. enspez; stopl.

VERTIKALE. 1. manik; pres. — 2. ovaci. — 3. diven; risk. — 4. teda. — 5. deĵor; dres. — 7. ungeg. — 8. neces; akso. — 9. te; en. — 10. sanga; izol. — 11. rubus. — 12. varbi; talp.


N-ro 40. HORIZONTALA. 1. kod; spik; kul. — 3. kapric; Kanad. — 5. neŝancebla. — Quo Vadis; agr. — agl; Zamenhof. — 11. ostaro; tenil.

VERTIKALE. 1. kokon; abol. — 2. enuig. — 3. depeŝ; lutr. — 4. akvo. — 5. spion; zorg. — 7. enig. — 8. kukol; estr. — 9. em, ktp; an, ktp. — 10 kanab; hont. — 11. lakto. — 12 Lidja; fald.

### N-ro 41. ALDONU LITERON.

Reordiginte la literojn de la ĉi-subaj vortoj, tiel ke novaj vortoj formiĝu laŭ la apudaj signifoj. La aldonitaj literoj, legataj de supre malsupren, formas proverbon.

1. ŝelo: ĝi fiksas pantalonon. — 2. lito: arbo. — 3. rido: parto de rado. — 4. paco: libera spaco en urbo. — 5. sano: birdo. — 6. kapo: festotago. — 7. nazo: besto. — 8. naĝi: nutri sin. — 9. filo: ĝi troviĝas en libro. — 10. puno: lu arta teksaĵo. — 11. peki: provizi per ĉiuj necesaj iloj. — 12. rava: tro ŝparema. — 13. sako: ĉiuj lernantoj el la sama lernejo. — 14. nevo: nutraĵo, precipe por bestoj. — 15 paŝi: kolekti monon, dank al moderna elspezo. — 16. volo: floro. — 17. lipo: ludilo. — 18. mato: ero. — 19. akra: facile komprenebla. — 20. baro: longa, lika lignopeco. — 21. gapi: subteni.



### N-ro 42. KRUCVORTENIGMO.

Horizontale. 1. kapo estas pli kara ol ĝi (R); identa (R); legomo (R). — 2. restanta ĉiam la sama. — 3. hodiaŭ; ekzameni (R). — 4. estigi (R). — 5. parto de vesto (R); ili estas troveblaj en herbejo en somera mateno (R). — 7. tion oni faras, kiam oni vestas sin (R). — 8. vazo (R). — 9. ĝi ĝigas nin terni (R). — 10. laŭtega (R); adverbo por akcenti aserton. — 11. tion ni faras en subita, forta lumo (R).

Vertikale. 1. ligilo (R); ĝi ekspiodas. — 2. preskaŭ insulta vorto por: homo; sufikso (R). — 3. fari sian eblon (R); parto asignita per sorto (R); rabobesto (R). — 5. razisto faras tion (R); akragusta vegetaĵo (R). — 6. larĝa strato kun arboj (R); legomo (R). — 7. zorgi pri la ekonomio de hejmo (R). — 8. granda aro da domoj (R). — 9. ne tute ĝusta (R). — 10. prefikso. — 11. ondolinie iri (R).

Sendu la solvojn sur aparta foilo al POSTBUS 342, BRUSSEL, antaŭ la 20.5. 1948.

## TURISMA - SERVO.

(de Flandra Ligo Esperantista)

Ĉiu interesato petu (kontraŭ afranko aŭ r.k.):

1. Turistajn broŝurojn kun vidindaĵoj, kartojn, k.t.p. pri lokoj en Flandrujo.
2. Loĝejon en Esperantistoj-Hoteloj aŭ ĉe samideanoj (kompense).
3. Gvidadon fare de gesamideanoj.
4. Reciprokan gastigadon.
5. Akcepto ĉe lokaj sekcioj de FL.L.E. al: Flandra Ligo Esperantista Turisma Servo - Postbus, 342, BRUSSEL - BELGUJO.

### KARAJ LIGANOJ:

La supran anoncon ni publikigos en internaciaj Esperanto-revuoj, kaj tial ni

## ANONCETOJ

DENOVE LIVEREBLA: la fama verko de Giovanni Papini: *Historio de Kristo*. Ampleksa libro 576-paĝa en bela, fortika bindo: 65 bfr. ĉe *Flandra Esperanto-Instituto*, P. V. Humbeekstr. 3, Brusel-W.

*Esperanto-Giumarĵoj*: ĵus aperis en Egiptujo du diversaj, placaj glumarĵoj. Haveblaj ĉe *Dro Todoros Megali*, ĉefdelegito U.E.A., P.B. 1914, Kairo, Egiptujo. Prezo: 100 ekzempleroj por 3 resp. kuponoj.

JUS APERIS: *Galileo Galilei* de Bento de Jesus Caraça. Biografio pri la granda astronomo kun ilustrita kovertpaĝo kaj unu elfaldebla karto. Prezo: brr. 20.— ĉe F.E.I., Brusel.

Deziras korespondi let. aŭ pk. pri mondlingvaj aferoj kaj interŝanĝi p.m. en kompletaj serioj, uzataj aŭ ne; proponas kiel eventualan bazon la katalogojn Zumstein 1948, Yvert 1948, Scott 1947, Michel 1943-44/45: Eug. TRZECIAK, Rzeszów, skrytka poczt. 60 — Polen.

Deziras korespondi kun flandroj pri Radio, Libro, Postmarkoj, Muziko, *Policano John C. RYAN*, R.U.C. Depot, Enniskjillen - C<sup>o</sup> Fermanagh, N. IRLANDO.

Abonu la internacian monaton revuon «Espero Katolika»: ĝi estas la plej bona, malnova kaj legata katolika Esperanto-revuo. Ĝi la jaran kotizon de 50 fr. per postĉekkonto n<sup>o</sup> 4217.34 de A. BECKERS, Overpelt-Fabrik.

Deense Esperantisten bezoeken Vlaanderen tussen de 1-e en de 15-e Juli.

Wie helpt hen aan logies? De afdelingen kunnen hier zeker bijspringen! Richt uw voorstellen aan: Vlaamse Esperantistenbond, Toerisme, Postbus, 342, Brussel.

petas vian helpon. La servo nepre bezonas lokajn kuntaborantojn, laŭmerite pagotajn. Precipe ni petas kuntaboron por la efektiviĝo de n<sup>o</sup> 2 & 3. Sciigu vian kondiĉojn! Tiuj kiuj povas iel kunhelpi al tiu nova, necesa servo vivigos konsiderinde la Flandran Esperanto-Movadon. Esperanto tiel montrigos praktika. Eksterlandanoj ĝenerale plej taŭgas kiel propagandistoj ĉe oficialaj instancoj. Ili prelegus en lokaj sekcioj, kuragigas la lernantojn kaj eĉ logas Flandrojn eksterlande. Tiamaniere ni kreskigos nian tutmondan amikaron kaj atingos la ĉefan celon de Esperanto.

Prizorganto de la servo estas: Ligano-St. LOECKX, Konijnenperken, 107, Brusel-Bosvoorde.

## 6.

Bedaŭrinde Zamenhof ne sufiĉe atentis la simplecon de la angla radikaro kaj la egan rolon de la angla lingvo pli vasta ol la germana, kiu en la verko Zamenhofs superas la anglan. Jen bonegaj anglaj radikoj (en krampo — malpli taŭgaj):

ston(ŝton)	fur(sulk)	repl(respond)
plez(plac)	up(supr)	revolt(ribe)
ruk(rigard)	blok(stip)	rut(radik)
kalm(trankvil)	stoc(strump)	klam(postul)
day(tag)	hik(singult)	perm(permes)
friday(vendred)	smir(ŝmir)	trus(pantalon)
svel(ŝvel)	slim(ŝlim)	los(pedik)

En la jaroj 1875-85 la germana lingvo estis admirata en Ock-Ruslando, kaj la germana nacio ankoraŭ montris siajn ungegojn kiel okazis post 1890. Do, Zamenhof pasive absorbis la aeron de sia medio, kaj respugulis ĝin en Esperanto. Do, la unua Esperanto-vizaĝo estis tradicia, arkaika, severe konservativa, eĉ kiam la nacilingvaro kvazaŭ kriadis: jen novaj vortoj, novaj formoj, nelongaj, elastaj, freŝaj! La dua vizaĝo estis revolucia, maîtrespektama por antikvaĵoj — unue en la aboco, fine en pluraj radikoj, pecoj da radikoj antikvaj: ok(okto), nau(novem), sep(septem),... & pliorde en radikoj ŝanĝitaj, eĉ plilongigitaj je la nomo de vera, aŭ nur ŝajna, reguleco: hieraŭ(hier), baldai(bald), hodiaŭ(hodie), jarumo(farina), vipuro(vipera), planeo(planeta), adulta(adultera), amo(amor), bol(boil), distri(distract), unu(un), fari(fak), li(il), k.m.a. Pri la enigma vorto edzo ni parolos poste, en la psikologia rigardo al la lingvo de Zamenhof.

Zamenhof komencis konstrui novan lingvon, ne konante antaŭajn laborojn. Tiam li sincere kredis ke li estas la unua kiu konstruas la unuan mondlingvon. Ne-profitante el la antaŭaj laboroj li devis ĉion iniciati, ĉion komenci de la komenco, ĉion fari provizore, prove, krude, por refari ĝin poste pli bone, por korekti en ĝi multon, kiu montrigis netaŭga. Je tia vidpunkto la lingvo de 1889 estis ankoraŭ embrio, provo de estonta lingvo. Serĉante en ĝi laŭeble pli da mankoj, eraroj, misvortoj, ni nur honorigas la aŭtoron. Ju pli malbona, mallerta estis la lingv-embrio en 1889, des pli meritplenis lia obstina laboro por la plibonigado... Ĉu estus ia merito, se Zamenhof donace elĉiele ricevus ian beletan lingvon, jam pretan? ! Talento sen obstina laboro estas senprodukta. Ju pli peniga estas la laboro de talentulo, des pli bona rezultas la produkto. Centoj da talentuloj brile komencis konstrui belajn mondlingvojn, brue nomitaj: *Lingua Lumina*, *Perfect*, *Mundolingue*, *Universal*, *Orbida*, *Kosmos*, *Mondea*, *Ultimate*,... sed mankis pacienco, obstino, kaj la komenco haltis, ne plu daŭris... En 1938 estis koleretaj kelkaj legintoj de mia «Evoluo», kiuj riproĉis al mi mian «harfendadon» & «pedikserĉadon» en la lingvo jam preta, jam perfekta. Ili ne komprenis mian taskon & metodon, kies vera celo estis nur la bono por Esperanto.

## DEVENO & VIVO

### DE LA LINGVO ESPERANTO

originale verkis: Petro Stojan

### INFLUO DE ANTAŬAJ ARTLINGVOJ

En 1879, en nokto sen dormo, la pastro Schleyer subite & neatendite — laŭ lia konteso posta, al la volapükanoj ekhavis la ideon pri la monda lingvo, unika, hejpa, regula, perfekta. Li verŝajne ne estus erudita, li ne scis ke tiu ideo cent, eble mil-roje estis proklamita jam de post 200 jaroj, precipe de *Leviniz*. En 1880 jam aperis kompleta gramatiko & vortaro de Volapük. Kvanke la aŭtoro komprenigis ke «vol» sencas «mondo», malgraŭ tio la psikanalizo emas vidi en ĝi nur senkonscian literaturan influon. La raciema filozofanto *Voltaire* influis per sia sonora nomo, al kiu sekvis *Volta*, fama elpensisto, samtempa kun *Volney*, ankoraŭ pli fama novemulo, aŭtoro de la universala alfabeto. La subkonscio de *Schleyer* verŝajne sugestis lin por famigi la kvaran, artefaritan (kiel la nomo de *Volney*), nomon de *volapük*, tutmonda palaco de la universala lingvo.

En 1880, kiam publikigis & famigis Volapük, kvazaŭ brilega fajroverko en nokto senluna, la estonta aŭtoro de Esperanto-lingvo jam laboris por sia projekto, kiun li nomis unue *Lingve Universala* & *Lingvo Universal*. Dum 5 jaroj, pasintaj ĝis difinitiva formo (1885), la juna Zamenhof konigis kun la stranga kreitaĵo de *Schleyer*, kun ĝiaj virtoj & miscroj, kun la brua volapükista propagando, kiu diradis: «ni estas milionoj...», en la jaroj klam ili estis malpli ol 10.000. Zamenhof vidis en ĝi potencon rivalon, kiu li severe kritikis en artikoloj unuatempe, nekonataj por tiuj nunaj Zamenhofanoj, kiuj erare skribis en siaj historietoj pri Esperanto ke Zamenhof estis admiranto de *Schleyer*. Ĉefe, li evisis ripeti la erarojn de la volapük-aŭtoro, li faris «aliel», li ne kreis karikaturo-lingvon, sed senvole & kvazaŭ fatale li faris similiajn erarojn, pro la tuelpoka publika opinio. La esperantaj volapükajoj, kies parton ni jam vidis kiel rusimitajn kunmetaĵojn, floris en 1889-1895, poste maloftiĝis, fine preskaŭ malaperis; al ilia strangeta speco certe apartenas ankoraŭ nun uzataj: *finigo* (finajo, finalo gramatika), *denove* (ree), *pro* (por: morti pro la patrujo), *bovoviro* (virbovo), *miljaro* (jarmilo), k.t.p.

Sed, antaŭ Volapük aperis plifruaj projektoj, dudek aŭ tridek, el kiuj kelkaj estis en la biblioteko de Varsovio & Moskvo, eble eĉ en la libraro de lia patro, poligloto. Sed la vojo plej facila, por koni la artingvojn estis tiutempe la «Grand Dictionnaire Universel» de Larousse. En la volumoj X & XVI, 1873 kaj 1878, la juna Zamenhof povis legi pri la sistemoj de *Faiguet*, *Grosselin*, *Courtonne* k.a. La granda verko de *De Riva* (1788), nekonata al okcidentanoj, ĉar presita en Peterburgo, ekzistis en ĉiuj grandaj bibliotekoj de tiama Ruslando. Rimarkindas la flua sonoreco de tiu lingvo, kiu eble sugestis el Zamen-

hof la substantiv-finon je O. Jen ĝia specimeno: «*Ka-triemo figuro kompa doz linio egato...*»

La lingvo de *Reimann* (1877) markis la tri verbo-tempojn: a(pasint), i(stant), o(venont). Ankoraŭ pli sugesteca estis la «internacia lingvo» de *Courtonne* (1881) kiu proponis multajn vortojn, kiujn Esperanto (sendepende) adoptis preskaŭ samforme: *arbo, jago, nukso, fruĝto, dum, pro, sed, sub, qe, disqo, avo, urso, fumo*, k.m.a.

En siaj unuaj provoj, Zamenhof uzis la nomon «lingvo universala», kaj tunc, li subite ŝanĝis ĝin je «lingvo internacia». Poveblas ke tiu definitiva nomo venis kiel influo de la lingvoj de *Reimann* kaj *Courtonne*, ekkonitaj de Zamenhof lastmomente.

La aglutina strukturo de Esperanto, kiu donas al ĝi iom da azia naturo (kiel en tata, turka, japana lingvoj), t.e. la nevarieblaj radikoj & afiksoj, kiuj kombingas neŝanĝante sian fromon, — tiu strukturo ne estis pensita de Zamenhof, nek influo de iu azia lingvo. La aglutina strukturo estis malnova ideo de pasigrafioj kaj aprioriaj lingvoj, kiuj adoptis kiel absolutan aksiomon, ke la artefarita lingvo estu regula ne nur en sia gramatiko, sed ankaŭ en sia vortaro & radikaro. La aŭtoro de «Langue Internationale» (1875), *E. Courtonne* (rouen), kiu anas, ke li jam en 1827 komencis labori pri «simpligita lingvo», formulas en la gramatiko de sia «nova» lingvo jenan regulon: «Ĉiuj elementoj de niaj vortoj... estas konsiderataj kiel radikoj. Tial, la finajoj, la afiksoj, la prepozicioj & eĉ kelkaj interjekcioj servas al ni kiel radikoj por formi substantivojn, adjektivojn, verbojn & adverbojn». *Courtonne* formas siajn vortojn el nesangeblaj elementoj, absolute kiel tion faris Zamenhof dudek jarojn poste. Ankaŭ Zamenhof diras, ke «la gramatikaj finajoj estas konsiderataj kiel memstaraj vortoj» (*Fund. Gram.* 11). *Courtonne* regule formas siajn vortojn: islo(insulo), islado(insularo), lago(lago), lagulo(lageto), dis(dis), disar(disigi), survesto(palto, suituto), sanisto(kuracisto), sanasto(ĉarlatano), sanisma(medicino). Adoptinte la principon, ke ĉiuj radikoj devas esti unusilabaj, *Courtonne* kripligis preskaŭ ĉiujn internacie konatajn radikojn. Same faris poste *Schleyer*. Zamenhof sukcesis precipe pro la natura aspekto de la radikaro. Legante la unuajn 40 paĝojn de la verko de *Courtonne* (1875), kie li donas generalaĵojn, principojn & klarigojn pri la lingvo artefarita, oni plurfje estas mirigita, trovante esprimojn kiuj preskaŭ laŭvorte ripetigas poste ĉe Zamenhof en liaj unuaj broŝuroj (1887-1889). Se nia majstro inspirigis el *Courtonne*, almenaŭ por kelkaj punktoj, *Courtonne* inspirigis de *Rambosson*, *Letelier*, *De Rudelle* & *Grosselin*, kiuj siavice estis spiritaĵoj de *Vater*, *Maimieux*, *Delormel*, *Faiguet* & de la granda *Leibniz* — kiu almenaŭ ne kaŝas kiel ĉiuj liaj posteuloj — ke li influigis de *Wilkins*, *Kircher*, *Lull* & mezepokaj kabalistoj.

(Daŭrigota)

Veraniv. uitgever: Vlaamse Esperantisten-Bond. Postbus 342, Brussel. — Drukkerij: J. Van Laer, Oude Vaartstraat 110, Turnhout.